

Alessio Giordano

Istituto Universitario di Studi Superiori Pavia, Italio / Italy

Recenzo de la libro

Caligaris, Irene. 2021. *Unu lingvo por ĉiuj, unu lingvo de neniu lando: surkampa esploro pri la esperantaj identecoj*. Pisa: Edistudio.

Kial, en la 21-a jarcento, oni daŭre lernas esperanton? Kiajn identecojn kunpartoprenas la esperantistoj? La verko de Irene Caligaris prilumas kelkajn el la duboj, kiuj delonge akompanas la sciencajn esplorojn pri la esperanta medio, ĉu kultur-historiajn, ĉu socilingvistikajn.

Unu lingvo por ĉiuj, unu lingvo de neniu lando, aperinta en 2021, estas esperantigo de la verko *Una lingua per tutti, una lingua di nessun paese*, plurpremiita magistrea tezo, kies referanto estis prof-o Federico Gobbo, unue eldonita en la itala de Aracne en 2016, kun reeldono far Bunta Esperanto-Asocio en 2017. Temas pri surkampa esplorado disvolviĝinta dum du esperantaj eventoj en Italio: la Internacia Junulara Festivalo en Castelsardo (2014), urbo norde de Sardinio; kaj la Itala Kongreso de Esperanto en Fai della Paganella (2014), en la norda Italio, proksime de Trento. La aŭtorino profitis la du eventojn por kolekti datumojn kadre de sia enketo pri la esperantaj identecoj, kuntrenante sume 93 intervjuitojn (28 en Castelsardo kaj 65 en Fai della Paganella). Malgraŭ la ne tro granda partopreno, kiun Caligaris mem konstatis, la valoro de la verko estas evidenta, kaj la esplorado indas eniri la repertuaron de la nuntempaj pioniraj socilingvistikaj esploroj.

La esperanta traduko preskaŭ entute spegulas la italan originalon, krom du novaj enkondukaj paragrafoj kiuj dankas la tradukintojn kaj aldonas la nomojn de du verkoj tiam ankoraŭ ne eldonitaj, nome *UEA en konscio de esperantistoj* (Galor kaj Pietiläinen 2015) kaj *Esperanto Revolutionaries and Geeks. Language Politics, Digital Media and the Making of an International Community* (Fians 2021); tamen, la koncernataj tekstoj estas taksataj de la aŭtorino nur kiel menciindaj, aldonante nenion pri ties enhavo. Temas, efektive, nur pri traduko, kiu nenion novan aldonas al sia unua eldono.

La esploro situas mezvoje inter la kvalita kaj kvanta metodologioj; kelkaj datumoj estas analizitaj laŭkvante, per diagramoj kaj grafikaĵoj, dum aliaj estas konsideritaj je laŭkvalita bazo. Per komparado kun la rezultoj de la enketo, la aŭtorino difinas la esperantan identecon io malfacile difinebla. Komprenoble, ne povis ekzisti unu esperanta identeco, ĉar la interkultura

ebeno de kie venas la esperantistoj ĉiam spicis la unuopajn alirojn al la lingva fenomeno per apartaj pensmanieroj. Se tio okazis por la malmultaj partoprenintoj al la menciitaj esperanto-eventoj, ĉu estus tro aŭdace antaŭvidi ke la samo validu ankaŭ por la cetera parto de la esperantistaro? Verŝajne ne, ĉar Caligaris etendas siajn konkludojn per skizo de tipa esperanto-parolanto, kies aparta lingva identeco kreas propran identigan spacon flankiĝante al aliaj identecoj, etnaj, naciaj, kaj tiel plu, sen ilin kontraŭi aŭ konkurenci (p. 372).

Post dialogo kun parto de la literaturo pri la rilato inter lingvo kaj identeco, plejparte kun la verkoj de Humphrey Tonkin (2006) kaj Nikola Rašić (1994), la aŭtorino alvenas je la konkludo ke, ĝenerale, esperantisto neniam perceptas esperanton kiel fremdan lingvon, kaj ke esperanto permesas sentigi malsamajn homojn proksimaj eĉ dum diktaturoj kaj militoj (p. 387). Alveni de tio al la aserto de André Martinet, tuj poste citita, ke universala alpreno de esperanto implicus pacon en la mondo, estas ja troigo, sed Caligaris certigas ke hodiaŭ neniu esperantisto kapablus plupensi tion (p. 382).

Aparte gapiĝas la fakto ke el *Literatura Foiro*, revuo en kiu, de pli ol 50 jaroj, pri la esperanta identeco kaj kulturo aperadis kaj daŭre aperadas sennombraj kontribuoj, estas menciita neniu artikolo.

Ĉiel, se la esperantan identecon oni elektas kaj konstruas propravole, kiel Caligaris asertas en sia konkludo (p. 388), malfermiĝas la ebleco al novaj formoj de identeco, eĉ pluraj kaj samtempaj, foje kontraŭdiraj, sed ne ĉiuj efemeraj, kaj tial indaj je pliprofundigo kaj respekto. La aparteno al lingva komunumo pro propra elekto memorigas, krom la Manifeston de Raŭmo, la vortojn de la franca filozofo Ernest Renan (1823-1892), laŭ kiu identeco estas ĉiutaga plebiscito – esprimo kiu siatempe tre plaĉis ankaŭ al Edmond Privat, se rilate esperantistojn. Efektive, laŭ la aŭtorino la esperantistoj estas “proprasenca popolo”, kies unuiĝo kaj ekzisto ŝuldiĝas al la kultura identeco de la esperantistaro, kiu siavice baziĝas sur profunda kerno, nome “la solidarecinto al aliaj homoj, la deziro plivastigi siajn kontaktojn, starigi novajn kaj fortajn amikajn rilatojn, plukultivotajn spite la tempopason kaj la plurkilometrigan distancon” (p. 384).

Kelkaj pli kritikaj rimarkoj koncernas la historian ĉapitron (§ 3), kiu estas tamen nur parte kuplita al la cetero, eble por doni al la neesperantista leganto sintezan prezenton de la esperanta fenomeno, de Zamenhof ĝis... la Manifesto de Prago. Kio okazis dum la lastaj dudek kvin jaroj, kiuj interalie estis la jaroj en kiuj sufiĉa kvanto da intervjuoj eklernis esperanton, estas informo kiun la leganto devas serĉi aliloke, kvankam certe pli utila cele al la kompreno de la verko ol la Ido-skismo. Aldone, mankas ajna referenco al la agnosko far *PEN International* de la Esperanta PEN-Centro en 1993, evento taksata de William Auld minimume tiom grava, kiom la iama sukceso de

UEA ĉe UNESKO (Silfer kaj Minnaja 2015, 483), al kiu, male, estas dediĉitaj pluraj paĝoj.

Krom tio, la valoro de la verko ne estas difektita, eĉ malgraŭ kelkaj neperfektaĵoj el historia vidpunkto, kiuj tamen devas esti signalitaj. Caligaris skribas (p. 102) ke Hector Hodler mortis tridektrijara; li naskiĝis la 1-an de oktobro 1887, sed forpasis la 31-an de marto 1920, do li ne atingis sian tridektrian jaron (Kökény kaj Bleier 1986, 221). Cetere, estis ĝuste Hodler kiu proponis la sufikson *-i-* por la landnomoj, anstataŭ la jam ekzistanta *-uj-* (Minnaja 2018, 192-193), dum la aŭtorino plurloke indikis en Eŭgene Lanti la enkondukinton de tiu morfemo (p. 106-107 kaj p. 210 n. 40).

Bedaŭrinde, la nerektaj citaĵoj (signalitaj per interkrampaj referencoj) estas svagaj kaj ne klaraj; Caligaris citis unuopajn verkojn sen referenco al specifa(j) paĝo(j), tiel igante la konsulton de la koncernataj dosieroj tempoperda, se ne entute neutila. En plejparto de la kazoj, manko de paĝoj malpermesas komparadon kun aliaj dokumentoj kaj devigas la fakulon antaŭeniri la legadon nur fidante je la sincereco de la aŭtorino – kio por si mem estus grava manko en scienca verko, sed pro la fakto ke la kerna parto kuŝas en la analizo de datumoj kiu ne postulas nek bezonas citi alion krom la kolektitajn materialojn, tiu manko estas tolerebla, sed apenaŭ. Aldone, malgraŭ tio ke la verko estis elitaligita al esperanto de kvar homoj, plus ĝenerala fina reviziado de kvina, enestas en ĝi pluraj mistaĵoj.

Konklude, *Unu lingvo por ĉiuj, unu lingvo de neniu lando* prezentas la esperantistaron ne nur kiel parolantaron aŭ movadon, sed ankaŭ kiel apartan specialan popolon kies membroj estas ligitaj pro komuna identenco propravole alprenita, pro ĉiutaga plebiscito bazita sur la sama interna ideo kiu inspiris Zamenhof unu jarcenton antaŭe, daŭre spurebla kiel kerna, esenca punkto en ĉiuj aliroj al esperanto: igi la mondon pli bona. Ĉu tiu ideo, ankoraŭ hodiaŭ, inspiradas ĉiun esperanto-parolanton, aŭ almenaŭ plejparte? Tion mi taksas vere tro aŭdaca konkludo.

Bibliografio

- Fians, Guilherme. 2021. *Esperanto Revolutionaries and Geeks: Language Politics, Digital Media and the Making of an International Community*. Cham: Palgrave Macmillan.
- Galor, Zbigniew kaj Jukka Pietiläinen. 2015. *UEA en konscio de esperantistoj*. Dobřichovice: Kava-Pech.
- Kökény, Lajos kaj Vilmos Bleier, red. 1933–1934. *Enciklopedio de Esperanto*. Nova eld. 1986. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio.
- Minnaja, Carlo. 2018. *Historio de la Akademio de Esperanto*. Milano: Itala Esperanto-Federacio.

- Rašić, Nikola. 1994. *La rondo familia: sociologiaj esploroj en Esperantio*. Pisa: Edistudio.
- Silfer, Giorgio kaj Carlo Minnaja. 2015. *Historio de la Esperanta literaturo*. La ChauX-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro.
- Tonkin, Humphrey. 2006. *Lingvo kaj popolo: aktualaj problemoj de la Esperantomovado*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

Pri la recenzanto

Alessio Giordano (1997) magistriĝis pri lingvistiko ĉe la Universitato de Pavio, per tezo pri lingvaj politikoj kaj lingva identeco en Osetio. Ri okupiĝas pri lingvoplanado en Kaŭkazo, kun aparta atento al la oseta kaj al la nordokcidentaj kaŭkazaj lingvoj; nuntempe ri estas redaktoro de *Il Chiasmo*, magazino de Itala Enciklopedio Treccani kaj vicĉefredaktoro de la esperanta revuo *Literatura Foiro*, oficiala organo de Esperanta PEN-Centro. Ri estas aŭtoro de naŭ sciencaj artikoloj en *peer review* kaj pli ol kvardek kontribuajoj en magazinoj kaj revuoj.

Retadreso: alessio.giordano@iusspavia.it

ORCID-numero: 0000-0001-8559-0625

About the reviewer

Alessio Giordano (1997) has a BA in Philosophy at the University of Macerata and a MA in Linguistics at the University of Pavia. They are part of the editorial board of *Il Chiasmo*, magazine of Treccani Institute, and of *Literatura Foiro*, official organ of the Esperanto PEN Centre. They published several peer-reviewed scientific articles and more than fifty contributions in magazines and journals.

Sul censore

Alessio Giordano (1997) è dottore magistrale in linguistica presso l'Università di Pavia, e dottore triennale in filosofia presso l'Università di Macerata. Attualmente fa parte della redazione de *Il Chiasmo*, magazine dell'Istituto dell'Enciclopedia Italiana Treccani, e di *Literatura Foiro*, organo ufficiale del Centro PEN Esperanto. Ha pubblicato diversi articoli in *peer review* e più di cinquanta contributi in magazine e riviste.